## Memore al Nikolao Kurzens

Mirigi ne povis la sciigo ke nia granda poeto Nikolao K u r z e n s, 49-jara, elektis la morton, sed tamen ĝi skuas nin. Al mi ĉi tiu sinmortigo ŝajnas akuzo al la aĉa mondo kiu estas nia, al ni, homoj, kiuj kreadas tiun aĉon. Kiel junulo K u r z e n s jene poemis:

*LACA PENSO*

*Mi estas laca. Nur kun peno treni*
*mi povas min antaŭen, kun malbeno*
*pri la obtuza muĝo de l' amaso.*
*Ĝi min ĉirkaŭas, kvazaŭ flava gaso,*
*envolvas ĉion, igas koron sveni.*

*Mi estas laca. Serĉas vane mano*
*la anson de l' savanta pord'. Rikane*
*algapas min la blanka lum' elektra.*
*En ĝi ne gajas koloraro spektra,*
*ĝi - tipa, abomena amasano.*

*Forpuŝi volus mi la polvan grizon*
*de l' urbo, animforton sufokanta,*
*ĵetiĝi beste al l' amaso vanta;*
*ĝin sange bati, mordi, tigre ŝiri! -*
*Sed - ja ne eblas plu, - mi estas laca ......*

*AL LA SORTO*

*Ne donu al mi duonĝuon*
*Kaj ne igu min vivi duone; -*
*mia kanto jubilu plensone,*
*estu vivo, ne teda enu' !*

*Mi ne volas dum viv' sendecide*
*duondormi de horo al horo:*
*Se ja morti, do morti, sen ploro,*
*sed se vivi, do vivi sen brid' !*

Mirigi povas nur ke tiom da jaroj li tamen eltenis. Per sia verko kaj per sia fina faro li vivu plu por ni. — W. P. R.



92 SIR

### Nekrologo

Prof. D-ron Hugo S i r k nelonge post la Varsovia kongreso trafis trafik-akcidento. Ankoraŭ el la malsanulejo li skribis pri sia Varsovia ISU-prelego, kiun li intencis pretigi por aperigo en Scienca Revuo. Kvankam la sekvoj de la akcidento komence ŝajnis ne tre gravaj - Prof. Sirk skribis pri rompita kruro -, nia simpatia kaj aktiva samideano mortis pro ili.

Prof. Sirk antaŭe instruis fizikon ĉe la Viena universitato. Li estis unu el la plej aktivaj membroj de ISAE. Sur p. 4 de la unua numero de Scienca Revuo (de antaŭ 11 jaroj) aperas lia nomo kiel delegito de ISAE en Aŭstrujo, kiun funkcion li plenumis ĝis sia morto. Krome li estis membro de la komitato de ISAE.

Liaj ISU-prelegoj aperis en Scienca Revuo **6** 3-14 (Munkeno, 1951), **6** 91-102 (Parizo, 1950), **7** 124-137 (Zagreb, 1953), **8** 122-145 (Haarlem, 1954), **9** 41-50 (Kopenhago, 1956), **10** 73-85 (Marsejlo, 1957) kaj **11** 53-70 (Majenco, 1958), kaj ampleksas entute 103 paĝojn, t.e. ĉ. 6 % de la ĝis nun aperintaj paĝoj de Sc. R. Ankaŭ en *Sciencaj Studoj* aperis artikolo lia. Li ne nur aktivis en la scienca kampo, kiel montras versaĵo lia, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj en *La Praktiko*, kaj ĉarma porinfana libreto kun traduko lia de la fabelo *Fingrulino* de A n d e r s e n.

Dankon al li pro la multa laboro kiun li fidele faris. Nun aliaj prenu sur sin la taskojn kiujn la morto deprenis de nia karmemora samideano S i r k.

92 SLIJ

### Nekrologo

Mortis en la pasinta aŭtuno nia membro Chr. F. W. Slijper en Utrecht, Nederlando. En Sc. R. **10** 2-35 aperis de li prilaborita „Terminaro pri la ekstera morfologio de la florhavaj plantoj". Jam dum jaroj S-ano Slijper, pensiita inspektoro de la instruado en Indonezio, suferis de kormalsano. Li ripozu en paco.

408.92 : 62(05) = 50
408.92 : 945.31(05) = 50

## POR ESPERANTO EN LA PRAKTIKA VIVO

Dank' al klopodoj de s-ano Pierluigi Marelli, sekretario de Itala Scienca Klubo Esperantista (ISKE), du italaj fakrevuoj: „Rivista di Meccanica" (Revuo pri Mekaniko) kaj „Ingegneria Meccanica" (Meka-